

Wilhelm Busch,  
Aventuroj de fraŭlo

*tradukita de Karl Vanselow*

*La ĉagreno*

Jam Sokrates en maljuna aĝo,  
Fama pro filozofia saĝo,  
Ofte diris kun ĉagrena sento:  
Multon en la mondo ni ne konas  
Kaj ĉi tiu scio-manko donas  
Kaŭzon por plendinda malkontento.  
Jes, ĉi tion oni certe scias.  
Same pense staras nun Tobias  
Knopp, la fraŭlo, antaŭ la spegulo.  
Kial estas li senedzinulo?  
Ĉiam gaja estas la vizaĝo  
De la birdo-viro en la kaĝo.  
Certe nur pro tio, ĉar lin ravas,  
Ke li ĉarman bird-edzinon havas.  
Kun envio diras Knopp al si:  
Do edzinon serĉu ankaŭ vi.  
La fidela Dorote'  
Ĉiam estas preta, se  
Servo iu ajn necesas,  
Kaj neniam ŝi forgesas  
Zorgi por la lito, por la ŝuoj,  
Por la kafo kaj manĝaĵaj ĝuoj.  
Ankaŭ kun kudrilo kaj fadeno  
Estas preta ŝi por helpa veno.  
Tamen ne forlasas lin la sento  
De malĝojo kaj de malkontento.  
Sur la antaŭa parto de l' kranio  
Ne trovas haron eĉ la fantazio,  
Kaj ankaŭ de la dorsa kapo-flanko  
Lin alradias pleno-luna blanko..  
Jes, en la spegulo de spegulo  
La haro-nombro estas nura nulo.  
Sed ne nur la brila kapo-blanko  
Estas kaŭzo por kontento-manko.

...

Lin ĉagrenas ankaŭ la amplekso  
De la ventro pro la tro-konvekso.  
Kion fari? Kontraŭ korpo-diko  
La helpiloj estas gimnastiko,  
Karlsbad-salo kaj marŝad-promeno.  
Ĉiutage jam en la mateno  
Uzas li de ili la aplikon.  
Ĉiutage li piede iras  
Malgraŭ la kapricoj de l' vetero  
Kelkajn horojn en la freŝ-aero  
Esperante la efikon,  
Kiun tiel ege li sopiras.  
Ĉiam ree la kuraĝon levas  
Lia diro al si mem: Vi devas.  
Tiel dum semajnoj du  
Li senlace agas plu.  
Jen starante nun sur la pesilo  
Li konstatas feliĉeg-ebrie:  
Dudek funtoj pezas li malplie.  
Senmezura estas la jubilo.  
Du semajnoj pasas plu denove.  
Ree uzas li pesilon prove.  
Sed - ho ve - ho kia malplezuro!  
Ĉu kredeble? Jen, la pez-mezuro  
Vere nun indikas tie ĉi  
Dudek funtojn jam denove pli.  
Ĉiu peno estis sen utilo.  
Malbenita estu la pesilo!

...

Ree kaptas lin animdoloroj.  
 Nun li pensas: Homoj kiel floroj  
 Estas destinitaj por perei.  
 Al la sorto devas ni obei.  
 Iam ankaŭ mi estinta estos,  
 Mia tombo sen ornamo restos,  
 Ĉar neniu homo resopiros  
 Aŭ funebre rememoros min.  
 Jes, neniu ploros, oni diros:  
 Tobbi Knopp ne interesos nin.  
 Parolante al si mem Tobias  
 Tiel plenda-kore fantazias.  
 Vidu, senekzempla ekzemplero  
 De larmego gutis al la tero  
 Tie, kie li sur benko sidis.  
 Sed kun firma volo li decidis  
 Al la fraŭlo stato fari finon.  
 Serĉi volas ankaŭ li edzinon.  
 Eble li konstati povos:  
 Kiu serĉas, tiu trovos.  
 Tiucele por vojaĝo  
 Kun espero kaj kuraĝo  
 Baldaŭ jam li preta estas.  
 Adiaŭ-dire do - ho ve -  
 Sola nun kaj forlasita restas  
 Lia bona, brava Dorote'.

*Traduko de la Germana poemo "Abenteuer eines Junggesellen" de WILHELM BUSCH (\*1832-04-15 – †1908-01-09) en Esperanton de KARL VANSELOW (\*1877-03-20 – †1959-12-28).*

*Arg-1053-2137 (2014-06-18 18:55:03)*

*Tiu ĉi esperantigo troviĝas en la poem-libreto "Nia Lingvo Esperanto", eldonita de Karl Vanselow. Pri tiu vidu la retejojn [http://de.wikipedia.org/wiki/Karl\\_Vanselow](http://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow) kaj [http://de.wikipedia.org/wiki/Karl\\_Vanselow](http://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow), ankaŭ: <http://vanselow.wikispaces.com/>.*